MIA ESPERANTISTA VIVO *Herman Deceuninck*

Mi ekkonatiĝis kun Esperanto en junulargastejo en Arras, Francio en la 1970-aj jaroj kie mi estis facinita de lumbildprelego de Claude Martins, nordfranca esperantisto el Roubaix, kiu faris aventureman biciklovojaĝon tra Nord-Afriko.
Tie li renkontis homojn kiuj vivis en subteraj domoj.
Claude interpretis por mi kaj amiko al la franca.
Tamen nek mi kaj mia amiko lernis Esperanton.
Pli poste ni ambaŭ faris biciklanvojaĝon tra Danio, kie hazarde ni denove renkontis kroatan esperantiston, kiu invitis nin al la IJK, kiu tiam okazis en la sama urbo.
Ni ŝatis la etoson sed ne lernis Esperanton.
Dum alia vojaĝo al Grekio ni vizitis la urbon Tessaloniki kaj tiam ni jam sciis ke tie okazis la IJK, sed denove ni ne lernis la lingvon.
Dum restado en Tours, Francio, kie mi estis por plibonigi mian scion de la franca, mi havis la okazon viziti la landan Esperanto-kongreson, kie mi interkonatiĝis kun Rita Galmache, esperantistino el Eupen, Belgio. Ŝi estis plia invito al lernado de la lingvo kaj tiam mi mem decidis lerni iom la lingvon.

La vera lernado komencis kiam ,en Germanio, Hermann Behrmann lanĉis kampanjon por trovi 2000 testpersonojn, kiuj senpage volus lerni la lingvon per lia kurso '*Esperanto Programita'*. Mi finfaris la kurson kaj poste prelegis germane pri Esperanto en altlernejo kie mi studis ankaŭ la germanan.
Ekde tiam mi komencis esti esperantisto kaj partoprenis Esperanto-renkontiĝojn en Nederlando, Germanio, Bulgario, Hungario, krom en pluraj aliaj landoj en Eŭropo.

Danke al Esperanto mi legis ofte pri lingvaj problemoj, lingva egaleco kaj lingvopolitiko, temoj ankoraŭ aktualaj ĝis hodiaŭ en la kunteksto de Bruselo, kie en diversaj hospitaloj nederlandlingvanoj ofte spertas ke ili ne ricevas medicinajn zorgojn en la nederlanda.
Eble ne temas pri lingva problemo , ĉiuj parolu la francan, sed pri lingva politiko kiam la interlingvo (*lingua franca*) por ĉiuj estu la angla, proponita de iuj kiel prof. Van Parijs...

La ideoj esprimitaj en tiu artikolo estas sub la sola respondeco de la aŭtoro kaj neniel interpretas la opiniojn de la redaktistaro.